

Resumo de decidoj el la Estrarkunsido de ILEI, 16-18 aprilo, 2011

La estraro de ILEI, en cheesto de 5 el la 6 nuntempaj estraranoj:

Aprobis la starigon de multlingva retejo por ILEI, ene de la limoj de la nunjara buĝeto. La retejo komence havos provperiodon antaŭ la publika lanĉo. La nova kaj la nuna retejoj ekzistos paralele, ĉar ili celas malsamajn publikojn.

Decidis, ke la Konferenco en 2012 okazos en Ĉinio, surbaze de la sola ricevita invito. Tiu propono skizis eblojn en kvar urboj, el kiuj du estas preferataj: Xian en *Shanxi* provinco kaj Kunming en *Yunnan* provinco. ILEI kunlaboros kun la ĉina sekcio por elekti ĝis la fino de majo la urbon kaj la datojn (depende de baldaŭa findecido pri la datoj de UK). Tiel ni aperigos bazajn informojn, kotizojn kaj aliĝilon antaŭ Kopenhago.

Konfirmis finanĉan apogon el la Afrika Kaso de ILEI por la aprila seminario kaj ekzamensio en Rumonge, Burundo, por mildigi la kostojn por partoprenantoj.

Konfirmis finanĉan apogon por nun okazanta evento en Kinŝaso, Kongo DR, kadre de la jara disponigo de UEA por edukaj agadoj.

Konfirmiĝis, laŭ la sama bazo, finanĉaj rimedoj por postsekvi la rezultojn el la konferenco kaj seminario en Matanzas; praktike tiu apogo transiros al edukaj agadoj kadre de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) okazonta en Sao Paulo en Julio 2011.

Konfirmis sammaniere subtenon por la tri-jara kursaro pri interlingvistiko en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano; egalaj kontribuoj de UEA kaj ILEI permesas la anoncadon de kvar stipendioj kun valoro de po 250 euroj.

Fortigis la eblojn liveri altkvalitan simpozion kadre de la 44a ILEI-konferenco, kunlabore kun la Universitato de Kopenhago kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), pere de disponigo de mil-eŭra subteno de UEA.

Formulis manieron liveri membrokartojn al tiuj sekcioj aŭ homoj, kiuj deziras tion, kun minimumaj plusaj kostoj aŭ labordevoj je la internacia nivelo.

Decidis limigi la apogon por membrigo de personoj per la Koleghelpa Kaso al la jam deciditaj 25 ricevantoj; la plia dudeko da dezirantoj eniru atendovicon, esperante je pozitiva reago al refoje farota alvoko por apogo.

Konsentis inaŭguri retan anoncadon de anstataŭantoj por la komitataj kunsidoj en Kopenhago, kondiĉe, ke la anstataŭanto kunportu subskribitan paperan version de la rajtigilo al la konferenco.

Fiksis temon por la Tado de la Lernejo en Kopenhago: Edukado al Interkompreno.

Konsentas peti al la elekto-komisiono serĉi kandidatojn por la vaka sekretaria loko, cele al elektiĝo en Kopenhago, kaj anoncas novan laŭofican retadreson por atingi la sekretarion de ILEI, evitante la neceson uzi privatan adreson. La adreso estas:

ilei.sekretario@gmail.com

Intertempe tiu adreso gvidas al laborteamo bazita en Herzberg, kiu plenumas la sekretariajn laborojn.

La estraro plie trastudis provizoran finkalkulon de la kontoj 2010, fiksitis proponojn por influi buĝeton 2012 – kreota oktobre. Aliĝoj al Kopenhago atingis 54. La deklarita membronombro por 2011 estis sumigita kaj atingas ĉ. 500 – do longa vojo por preteriri la 755 el la pasinta jaro – seso da landoj devas ankoraŭ sendi membrolistojn. Abonoj al *Juna amiko* proksimiĝas al 400 – do pli restas sopirataj!

La kunsidado en ambaŭ estraroj (UEA kaj ILEI) disvolviĝis en pozitiva etoso, kiel ankaŭ la kunlaboro inter la du organizoj.

Raportas: La estraro de ILEI, Roterdamo, 18a de aprilo, 2011.